



Esperanto en Danio

22-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2015



2015

ESPERANTO

*ESPERANTO-
TAGO*

26.07.2015

Justa komunikado

Lernu Esperanton: www.lernu.net



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.05.2015

Enhavo

Ek al la centa.....	3
Tagordo de la Jarkunveno de DEA 2015.....	4
Okazos en Kopenhago.....	4
FORPASO.....	6
Historia angulo.....	8
La pereco de familio Zamenhof	9
Homarano.....	12
Vekiĝu!.....	13
Varsovio 1887 de A.Lopez	
Luna.....	15
Kio okazos en Esperantujo en 2015?.....	16
Pliaj sukcesoj de TEJO en Eksteraj Rilatoj.....	20
Esperantaj noveloj tradukitaj sveden.....	22

Ek al la centa....



Hodiaŭ mi eniris en la paĝaron de la kongreso kaj konstatis ke ĝis nun aliĝis jam 1813 personoj el 68 landoj. Do, mia sento aŭtune ke tiu estos vere rimark-ebla kongreso firmiĝis. Mi ankaŭ ĝojas ke ni alvenos al Lillo per nia propra bus-karavano, kun danaj membroj kaj kelkaj el niaj svedaj amikoj. Kelkaj membroj partoprenos la Kongreson por la unua fojo. Dum la vojaĝo ni havos tempon interkonatiĝi kaj ĝui agrablan etoson.

Dum la revenvojaĝo ni tranoktos en la okcidenta parto de Norda Germanio kaj mi tre baldaŭ informos rekte la aliĝintojn pri tio. Ni havas ankoraŭ kelkajn sidlokojn en la buso, kaj mi instigas tiujn kiuj ĝis nun ankoraŭ ne aliĝis, pripensi partopreni tiun historian kongreson!



Baldaŭ aperos la Dua Bulteno kun loĝejeblecoj kaj ekskursaj programoj, kaj nia ĉefdelegito pretas helpi la novajn membrojn. Eĉ se ni havas propran buson, mankas al ni sperta ĉiĉerono, kaj ni decidis ke estas pli bone mem decidi kiam kaj al kiu ekskurso oni deziras partopreni.

En la estraro ni dediĉis sufiĉe da tempo por tiu speciala aranĝo, kaj decidis ke ni ne jarkongresos printempe dum du tagoj kiel kutime, sed invitas niajn membrojn partopreni nur al ĝenerala kunveno de DEA, kiel vi povas konstati legante la invitilon.

Ileana Schröder

Tagordo de la Jarkunveno de DEA 2015

Sabate la 25-an de aprilo, je la horo 14.00 en Tomsgårdsvej 35

1. Elekto de kunvena gvidanto
2. Elekto de protokolanto
3. Jara raporto
4. Jara kalkulaĵo
5. Laborplano de DEA 2015-2016
6. Proponoj
7. Elekto de prezidanto
8. Elekto de estraranoj
9. Elekto de 2 anstataŭantoj
10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto
11. Jarkunveno 2016
12. Eventualaĵoj

Okazos en Kopenhago

Ni kunvenas en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, lunde je la 12.00 aŭ la 19.00 horo. Bonvolu noti ke la kutima enirejo estas barita pro riparlaboroj. Necesas eniri per la malantaŭa enirejo, ĉe la parkumejo.

Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

La estraro de KEK deziras al vi feliĉian kaj prosperan 2015!

9/2 je la 19.00 en ĉambro D.

Bent Jensenius gvidos.

La historio de instrumentadoj pri fremdaj lingvoj. Kiuj metodoj funkcias kaj kiuj ne funkcias? Kiu estas la plej bona metodo?

16/2 ne estas programo pro la vintra ferio.

23/2 je la 19.00 en ĉambro D.

Filmo. Nikolai Gogol: La revizoro. Subtitolita de Kirill Ŝvedov. Ĝi daŭros 124 minutojn, kaj ni trinkos kafo/teon meze de ĝi.

2/3 je la 12.00 en la supra etaĝo.

Betty Chatterjee gvidos. Ni legos la trian capitron (paĝoj 60–78) de Mia Fuena Infanaĝo, de Carl Nielsen. Se vi ne jam posedas la libron, ĝi estas aĉetebla por 100 kr.

9/3 je la 19.00 en ĉambro D.

Filmo 1. Klaus Maria Brandauer: Mephisto. Parolata en Esperanto. Premio “Oscar” kiel la plej bona eksterlanda filmo en 1981, festivalo de Cannes. Reĝisoro: István Szabò. Ĝi daŭras 2 horojn kaj 24 minutojn, kaj tial ni uzos du vesperojn por spekti ĝin.

16/3 je la 19.00 en ĉambro D.

Filmo 2. Klaus Maria Brandauer: Mephisto. Dua parto.

23/3 je la 19.00 en ĉambro D.

Babila vespero. Ne estas programo, sed bonvolu veni por diskuti ĉiutagajn aferojn.

30/3 je la 19.00 en ĉambro D.

Bent Jensenius gvidos. Jean Forge: SATIRA NOVELARO EL ESPERANTUJO Martiro de nia afero (el la libro: La Verda Raketo).

FORPASO



La 4-an de novembro 2014, post mallonga restado en malsanulejo, nia karulino Astrid Mariane Birkbak trankvile forpasis. Kvan-kam dum kelka tempo ŝi havis problemojn pri la sanstato, ŝia morto estas ŝoko kaj severa frapo al ni ĉiuj.

Astrid estis fervojisto dum preskaŭ 40 jaroj, kaj la natura kadro por esperanta aktiveco estis la fervojista movado. Ŝi, plej ofte kune kun Erik, estis eĉ tre aktiva membro de DEFA kaj IFEF dum jardekoj kaj jardekoj. Multaj fervojistoj ‘restas’ ĉe la fervojistaj movado, kongresoj kaj aktivecoj, Astrid partoprenis ĉie kun nelacigebla energio – kaj ŝi estis membro de DEA kaj KEK. Dum la lastpasintaj monatoj ŝi malfortiĝis kaj laciĝis, kaj oni vere sentis, ke tiu evoluo agacas ŝin, sed aliflanke ŝi devis akcepti la staton.

Ĉiam gaja kaj aktiva, la plej bona amikino en la mondo, talenta kantverkisto, scianta pri multaj temoj, – entuziasma pri ĉio, kion ŝi faris ... estas multaj belaj frazoj, kiuj venas en niajn kapojn ĝuste nun, sed ankaŭ la realeco klaras: ke ŝi ege mankos al ni en niaj kongresoj, en niaj klubkunvenoj, en niaj amikaj kunestoj ... se oni havas la feliĉon, ke oni renkontiĝis kun Astrid kaj spertis ŝin kaj aŭdis/legis ŝajn ĉiam valorajn kontribuojn, oni sentu sin bonŝanca.

Ŝi estas tre konata vizaĝo en la movado, kaj ni estas multaj, al kiuj ŝi nun mankas. Kompreneble, al ŝia edzo Erik kaj la familianoj tiu manko estas terura, kaj niaj pensoj iras al ili, kiuj nun bezonas ĉiujn fortojn por kune kompreni kaj prilabori la forpason kaj perdon de karulino.

La memoro pri Astrid restos por ĉiam ĉe ni.

Por ni Astrid estis granda parto de nia Esperanto-kreskado kaj de nia Esperanta vivo entute. Ni kune kun ŝi kaj Erik faris belajn vojaĝojn, aranĝis skisemajnojn kaj entute estis tre bonaj amikoj. Ni dankas pro ĉio kaj deziras, ke Astrid ripozu en paco!

Jan&Lene Niemann, DEFA.

Astrid estis kaj signifoplena Esperanto-membro kaj tre kara amikino de multaj el ni. Ŝi trankvile endormiĝis por ĉiam la 4-an de novembro 2014. Ŝi restos eterne en niaj memoroj, kaj ni precipe memoros ŝian serenon kaj inspiran pensmanieron.

Mi renkontis Astrid unuafoje en Germanio okaze de Esperanto-aranĝita skisemajno en Bayerische Eisenstein. Astrid estis la lumo por mi kiel komencantino en loko kie oni parolis nur Esperante.

Ni de tiam spertis multajn vojaĝojn kaj interesajn okazaĵojn. Ŝi inspiris min vidi la mondon pli vaste ol ĝis tiam kaj ankaŭ pli pozitive.

Kiun belan surprizon ŝi aranĝis por mia geedziĝo en la 1987-a jaro ene de la Urbodomo de Gentofte. Mi ĝojploregis sciante ke mi apartenas al la Esperanta familio.

Astrid ŝatis vojaĝi kaj travojaĝis la mondon. Ŝi aktivis kaj helpis "Bonan Esperon" en Brazilo dum multaj jaroj, sendante pakaĵojn kun varoj kiujn ŝi unue devis kolekti. Ŝi ankaŭ vizitis "Bonan Esperon" kaj helpis la tieajn infanojn.

Astrid verkis Esperanto-kantojn, ŝatis poemojn, legis multajn librojn. Ŝiaj hobiaj estis multaj. Ŝi donacis memfaritajn beligilojn faritaj el perloj disen en la mondon.

Mi lernis kuiru laŭ ŝiaj receptoj tre bongustajn danajn manĝaĵojn, kiujn oni manĝas dum Kristnaska tempo.

Kara Astrid, mi tutkore dankas al Dio ke mi konatiĝis kun vi kaj dankas por ĉio.

Dormu en Paco!

Ana Røssum

Historia angulo

Privata propono nedeviga por Homaranismo

En 1913 Zamenhof publikigis en malgranda broŝuro sian politikan-religian kredon por konigi ĝin al siaj amikoj. En la antaŭparolo Zamenhof klare antaŭvidas ke la malamikoj de Esperanto uzos tiun libreton kiel batalilon kontraŭ Esperanto. Tial por tute liberigi la Esperantistojn de ĉiu suspekta solidaro kun siaj privataj religiaj konvinkoj, li en la 8-a UK publike formetis de si ĉian oficialan rolon en la aferoj de la movado Esperanta. Zamenhof ne sukcesis fondi movadon por Homaranismo, tion malhelpis la militeksplodo kaj la morto de Zamenhof, sed troviĝis tre malmultaj personoj kiuj simpatiis kun tiu idearo.



— Historio de Esperanto, vol. 1, p. 390

Jen la plej gravaj partoj de la deklaro:

Mi estas homarano. Tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

I. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion.

II. Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. (...)

X. Kosciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religi-anstataŭantan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neutrale-homaj principoj “homaranaj”, kiuj konsistas en jeno:

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo “Dio” aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami aŭ

persekuti iun pro tio, ke lia kredo estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo.

c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi la homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri per senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas – se la leĝoj de mia lando tion permesas – malkaŝe kaj oficiale nomi min “liberkreda”, ne identigante tamen la liberkredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. [...]

La kompleta teksto estas legebla interrete:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Deklaracio_pri_Homaranismo

Nuntempe, kiam la religia netoleremo furoras pro la teruraĵoj fare de la senkonsciaj teroristoj, la pensoj de Zamenhof estas ege aktualaj kaj valoraj.

Ileana Schröder

La pereco de familio Zamenhof

La 27-a de januaro estis la Tago de la Memoro pri la Viktimoj de la Holo-kaŭsto. La memordato koincidas kun tiu de la liberigo de mortiga koncentrejo Auschwitz-Birkenau en 1945, kaj estis starigita de Unuiĝintaj Nacioj en 2005.

Jam en 1922 Hitler kondamnis Esperanton dum parolado en Munkeno. En *Mein Kampf* (1925) li substrekis la saman paranojan ideon, laŭ kiu judoj estis devigitaj paroli malsamajn lingvojn, sed kiel eble plej baldaŭ ili altrudos “universalan lingvon (ekzemple Esperanton)” por pli facile regi siajn servutulojn.

Akirinte la povon, Hitler baldaŭ ekpersekutis la laboristan Esperanto-movadon kaj likvidis la komunismeman eldonejon Ekrelo (Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo). Tamen, estis tiam en Germanio esperantistoj kun aliaj politikaj emoj. Herbert Wohlfahrt, kiu fervore admiris la nazian movadon, estis fondinta la *Neue Deutsche Esperanto Bewegung* (Nova Germana Esperanto-Movado) en 1931, du jarojn antaŭ la naciŝocialisma venko en la parlamenta balotado. Wohlfahrt klopodis altrudi la ideon, ke judoj ne povu esti delegitoj de UEA en Germanio.



Jad Vašem

En februaro 1936, Martin Bormann subskribis dekreton en kiu li asertis:

Ĉar la kreo de internacia mikŝlingvo kontraŭas al la bazaj konceptoj de la naciŝocialismo kaj finfine povas respondi nur al intereso de superŝtataj potencoj, la anstataŭanto de la Führer malpermesas al ĉiuj partianoj kaj membroj de la organizoj filiigitaj al la partio apartenon al ĉiuspecaj unuiĝoj de artefarita lingvo.

La 20-an de junio 1936 Heinrich Himmler, tiama estro de SS, ordonis al la Esperantaj asocioj dissolviĝi sub minaco esti perforte dissolvitaj. Esperanto kaj esperantistoj iĝis kontraŭleĝaj. Same okazis en la landoj okupitaj de la Tria Regno dum la dua mondmilito, kvankam ĉi tio ne malebligis, ke Universala Ligo estu fondita en 1942 en Hago.

La tri gefiloj de Zamenhof iĝis viktimoj de la nazia barbareco. Lidia kaj Zofia estis unue enfermitaj en la Varsovia geto kaj poste senditaj al Treblinka, kie ambaŭ mortis en gaskamero en 1942.

Adam Zamenhof estis ekzekutita en la arbaro Kampinos, apud Palmiry, scenejo de pli ol du mil murdoj dum la nazia okupacio de Pollando. Aliflanke, liaj edzino kaj filo (Ludwik) eskapis. La patrino kun sia filo kaŝis sin en kamparaj areoj de la lando sub falsa nomo. Ludwik alprenis la nomon Christoph Zaleski, kiu li poste konservis kiam li translokiĝis en Francion kiel Louis-Christoph Zaleski-Zamenhof. Al tiu periodo de kaŝita vivo apartenas ripetata anekdoto. Christoph estis en tomatplantejo, kiam kolego kiu parolis Esperanton demandis:

- Ĉu vi konas Esperanton?

- Ho jes, mi konas; ĝin inventis mia avo!



Spite la aŭdacan mispaŝon, la esperantisto ne denunciis lin al la nazioj.


La pola ĵurnalisto Roman Dobrzyński publikigis en 2003 libron de intervjuoj kun Louis-Christoph Zaleski-Zamenhof, la sola postvivinto de la Zamenhof-familio, sub la titolo *Ulica Zamenhofska* (Zamenhof-strato). Samjare aperis kaj esperantigo kaj postaj tradukoj en la litovan, ĉeĥan, portugalan, japanan, slovenan, slovakon, francan, italan, kroatan kaj korean.

En la sama Varsovia geto el kiu estis deportitaj kaj Zofia kaj Lidia Zamenhof, forpasis en 1941 **Leo Belmont** (kaŝnomo de Leopold Blumental), samtempulo de la Majstro. Belmont defendis Esperanton en la gazetaraj pola kaj rusa, kaj estis vicprezidanto de la unua rusa Esperanto-Societo (Petrogrado) kaj ankaŭ de la unua pola (Varsovio). Jam en 1887 (jaro de eldono de la *Unua Libro*) li adiaŭis Zamenhofon en letero per la esprimo “Vi venkos, sinjoro!”

El la blogo “Esperantaj bitoj”, <http://enesperantujo.blogspot.com.es/>

Homarano

Ekbruligis mi fajron en kor',
Ĝin estingos nenia perfort';
Ekflamigis mi flamon en brust',
Ĝin ne povos estingi eĉ mort'.
Brulos fajr' ĝis mi vivos en mond',
Flamos flam' ĝis ekzistas la ter'.
Nom' de l' fajr' estas am' al homar',
Nom' de l' flam' estas am' al liber'.



V. Eroŝenko

(El la verko “Lumo kaj Ombro”, kompilita de Mine Yositaka kaj eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo en 1979.)

VASILIJ JAKOVLEVIĈ EROŜENKO (1890–1952). Ruso, instruisto. Blindulo, malgraŭ sia handikapo li multe vojaĝis tra la mondo per Esperanto kaj instruis en multaj landoj de Azio kaj Eŭropo. Verkoj:

Ĝemo de unu soleca animo
Turo por fali
Rakontoj de Eroŝenko
Lumo kaj ombro
La tundro ĝemas
Malvasta kaĝo
Stranga kato.

Li vizitis Japanion por lerni masaĝon en 1914. Li loĝis en Tokio kaj konatiĝis kun multaj esperantistoj kaj intelektuloj. Ĝis tiam jam en Japanio troviĝis relative multe da esperantistoj, sed ili preskaŭ ne havis ŝancon paroli kun eksterlandanoj. Pro tio li ludis gravan rolon diskonigante Esperanton en diversaj lokoj kaj okazoj. Dume li instruis Esperanton ene de blindula lernejo. Rezulte naskiĝis nombro da blindaj esperantistoj en Japanio.

La lasta jaro estis la 100-jara jubileo de la alveno de Eroŝenko al Japanio, kaj tiu ĉi jaro estas 125-jara datreveno de lia naskiĝo. Tiuj jubileoj estas tre festataj en Japanio.

Vekiĝu!

Kelkaj aferoj restas ĉiam aktualaj. Jen artikolo en Dana Esperanto-Bulteno de la 3-a de marto 1969, de la tiama zorganto pri la Libro-Servo, Inger Ploug, plukita de Betty Chatterjee:

Kiel ĉiu nacia lingvo havas sian literaturon, ankaŭ internacia lingvo devas havi sian. Esperanto tion havas, sed se oni demandas homojn, kiuj scipovas Esperanton, ĉu ili konas la literaturon de la lingvo, tro ofte la respondo estas negativa.

Paroli la lingvon estas la plej grava afero, kompreneble, sed poste la legado estas same grava. Preskaŭ ĉiuj homoj lernas paroli antaŭ ol legi. Jam en la lernejo oni instruas pri la literaturo. Oni lernas distingi inter bonaj kaj malbonaj libroj, oni informiĝas pri la verkstoj, pri la bona stilo de la lingvo, k.t.p.

Tio estas grava afero, ĉar la literaturo estas la animo de ĉiu lingvo. Sen ĝi la lingvo ofte fariĝas seka kaj peza, kiel la kancelaria stilo, senviva kaj senĉarma. Dum la legado oni lernas la diversajn nuancojn de la esprimmanieroj, ekz. la satiron, la ironion. Iom post iom oni komprenas, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo, per kiu oni kapablas esprimi sentojn kaj pensojn.

Multe da homoj eklernas Esperanton. Post relative mallonga tempo iuj parolas la lingvon flue, sed aliaj restas sur tiu sama stadio, kiel oni ofte faras en nacia lingvo, se oni ne konas la literaturon originalan. Io estas erara, sed kio? Povas esti multaj kaŭzoj, sed ĉu ne unu el ili estas la malsufiĉa scio pri la afero? Ĉu ne kelkaj el la antaŭjuĝoj kontraŭ la lingvo Esperanto venas de tio, ke oni ne konas ĝian literaturon, sed opinias, ke la lingvo estas nur artefaritaĵo sen ebleco por esprimi la sentojn de la vivo?

La konkludo de tio estu pli bonan informiĝo pri la literaturo ne nur ĉe la malnovaj esperantistoj, sed precipe ĉe la novaj. Do – kion fari? Ĉu ne estus ideo trovi iun lertan esperantiston, kiu povas kaj volas prelegi pri ĉi tiu temo kaj eble laŭtlegi por la aŭskultantoj, komencante per facile legeblaj

libroj, kiuj ekzistas eĉ de la plej famaj verkistoj Esperantaj?

Al kio utilas la grandega laboro de la verkistoj, de la tradukistoj kaj eldonistoj, se neniu havas intereson por legi la librojn? Se oni nenion faras, la literaturo ne disvastiĝas, la laboro de la verkistoj, la eldonistoj k.t.p. estus tute superflua.

La bazaj verkoj de la internacia lingvo estas tiuj de d-ro L.L. Zamenhof. Ĉiu, kiu havas aktivan intereson, devus posedi almenaŭ kelkajn el la originale verkitaj, ekz.:

Fundamento de Esperanto

Originala Verkaro

Lingvaj Respondoj

Proverbaro Esperanta

kaj ankaŭ jenajn tradukojn:

Marta de Eliza Orzeszko

Hamleto de William Shakespeare

La sankta Biblio

Fabeloj de H.C.Andersen


La Batalo de l' Vivo de Charles Dickens.

Koncerne la Libro-Servon mi povas kun malĝojo atesti, ke la situacio estas nekontentiga. Multaj malfacilaĵoj estis kaj estas. Sen aktiva intereso de la esperantistoj Libro-Servo ne povas vivi kaj funkcii.

Jes! Mi bone aŭdas la murmuradon pro la prezoj. Kelkaj opinias, ke la libroj tro multe kostas. Ĉu vere! Ne forgesu la diversajn malplivalorigojn! Ne forgesu la akcizon [AVI; "moms"]! Komparu la prezojn kun la prezoj de la danaj libroj! Se la Libro-Servo ne povus gajni kelkajn procentojn por pagi la elspezojn kaj por aĉeti novajn librojn, la tuta afero estus mortkondamnita. Tion vi certe komprenas!

Mi havas la ardan deziron, ke ni ĉiuj faru pli por progesigi la literaturon. Per tio ni kontribuas al la progreso de la internacia lingvo Esperanto.

Varsovio 1887 de A.Lopez Luna



Varsovio 1887, kiu estas historia romaneto (70 paĝoj) pri la vivo de Ludoviko Zamenhof, estis eldonita en la jaro 1986. La verkinto, Anastasio Lopez Luna naskiĝis Bonaero en 1914, kaj li esperantistiĝis en 1934. Krom teatraĵojn kaj filozofiaĵojn en Esperanto li ankaŭ verkis historian romanon pri Zamenhof en la hispana. Laŭ la prezento de tiu ĉi libro, ĝi estas originale verkita Esperante.

Jen la modesta celo de la verkisto: “La paĝoj de ĉi tiu verko, kiun vi havas inter la manoj, intencas prezenti kelkajn epizodojn de la vivo de tiu geniulo nomata Lazaro Ludoviko Zamenhof, ĉio en romanigita

maniero.” Laŭ mia opinio li atingis sian celon. La epizodoj inkludas la malagrablajn travivaĵojn en Bjalistoko dum la infanaĝo, kiuj konvinkis lin, ke ia neŭtrala lingvo interkomprenigus malsamajn gentojn. Per la epizodoj li rakontas pri la kreado de la lingvo kaj la malfavoraj reagoj de la patro, kiu opinias, ke la ideo pri internacia lingvo estas senutila utopio.

La verkisto pentras vortbildon pri tre serioza junulo, kiu pro sia revo neniam havas la tempon amuziĝi kiel aliaj junuloj. Kvankam la romano estas distra, ne mankas al ĝi interesaj faktoj pri la vivo de Ludoviko Zamenhof kaj la evoluo de la lingvo Esperanto.

La lingvaĵo estas sufiĉe facila, kaj pro tio ne necesas tro ofte konsulti la vortaron. Fakte ĝi bone taŭgas kiel antaŭdorma legaĵo.

Pri la prezo: Vi ja scias, ke la respondeculoj de Dana Libro-Servo estas la plej malavaraj homoj en Esperantujo. Ili fordonacas librojn al ni kontraŭ preskaŭ nenio. Ili nur volas legigi nin.

Tiu ĉi libro kostas 10 kronojn. Rapidu aĉeti ĝin – ne prokrastu!

Betty Chatterjee

Kio okazos en Esperantujo en 2015?



Komenciĝis nova jaro aparte interesa por la esperantistoj. En 2015 decidiĝos la sorto de UEA, ĉar la estraro devos elekti posteulon de Osmo Buller, la ĝenerala direktoro – kerna posteno por la tuta Esperantujo. Tiu decido pli ol aliaj influos la estontecon de la asocio kaj la movado. Krom tio okazos la jubilea, 100-a Universala Kongreso

kaj TEJO donos (aŭ ne?) la ŝancon por okazigi la unuan IJK en Afriko. Kio ankoraŭ atendas nin en 2015?



La 15-an de decembro 2014, en la Zamenhofa tago, La Ondo de Esperanto anoncis rezulton de la tradicia konkurso “Esperantisto de la Jaro”. La merita laŭreato estas Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI kaj kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo. La oficiala anonco aperos en la januara numero de LOdE kaj la kutima intervjuo en februaro. Tiam pli vasta publiko verŝajne ekscios iom pli pri la aktualaj laboroj en nia instruista asocio. Ankaŭ ĝiaj planoj por la estonteco estas gravaj, ĉefe por tiu proksima – post kelkaj monatoj devus okazi la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto, pri kiu dum kelka tempo aŭdiĝis neniuj novaĵoj.

En la sama februara kajero de La Ondo aperos – kiel ĉiujare depost la malapero de Hungara Vivo – resumo pri la libroproduktado en Esperantujo. Kun la furorlisto de la Libroservo de UEA el la marta Esperanto en la manoj eblos juĝi pri la aktuala stato de la Esperanta libromerkato. Laŭ la statistikoj pri la antaŭa jaro la produktado iomete kreskis, sed la vendoj daŭre falas. En la unua kvaronjaro ni scios ĉu la plej grava branĉo de la Esperanto-ekonomio falegas aŭ nur daŭre ŝrumpas. Tiujn datumojn ni

ne rajtas neglekti, ĉar la libroj estas esenca parto de la Esperanto-kulturo kaj sen amaseto da novaj interesaj legaĵoj ĉiujare Esperantujo iĝus malpli interesa – same por la esperantistoj, kiel ankaŭ por la potencialaj novuloj. Ni ne lasu nian kulturon forvelki (= aĉetu librojn! kaj laŭeble ankaŭ legu ilin...).

En **marto aŭ aprilo** devus okazi la estrara kunveno de UEA. En la tagordo certe troviĝos la demando pri la nova ĝenerala direktoro. La emeritiĝontan Osmo Buller estos malfacile anstataŭigi per taŭga homo. La postulataj kvalifikoj kaj kompetentoj ne staras en ekvilibro kun la laborkondiĉoj, kaj la modernigema teamo certe tion bone komprenas. Estas neniuj duboj, ke la pensiiĝo de Buller signifos ne nur personan ŝanĝon en UEA, sed ankaŭ modifon de la nuna strukturo. En 2015 pasos 60 jaroj ekde la translokigo de la Centra Oficejo al Roterdamo kaj espereble la ŝanĝo de la direktoro ne estos okazo por pliaj diskutoj pri translokigo, kiun ni tute ne bezonas.

La estraranoj verŝajne traktos ankaŭ la elekton de kongresurbo de la 102-a UK (2017). Pri la decido ni ekscios eble nur **la 1-an de aŭgusto** (en la solena fermo de Lillo), sed estus bone por la tuta movado, se oni farus ĝin jam en Roterdamo. Nur ĝi metos finon al la akra konkurado inter Montrealo kaj Seulo, kiu iĝis tute publika kaj transiris al Facebook. Nun Montrealo (804) superis Seulon (665) en la nombro de paĝ-ŝatantoj, sed tio ne nepre influos la finan rezulton. Ankaŭ el la retaj disputoj venas neniuj konkludoj. Neniam antaŭe la streboj iĝi organizanto de UK estis tiom publikaj kiom nun kaj neniam antaŭe ili tiom dividis la esperantistojn. Kelkaj eble ĝojas, ke la decidoprocezo estas pli travidebla, sed la reguloj pri la elekto de kongresurbo fakte ne ŝanĝiĝis kaj la koncernaj Facebook-paĝoj donis nur furaĝon por la klaĉoj kaj malafablaj komentoj en Facebook. Interese, inter la decidantoj estas Mark Fettes (Kanado) kaj Lee Jungkee (Korea Resp.) – du estraranoj de UEA el ambaŭ respektivaj kandidataj landoj.

La Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto estas planita por **la**

13–16-a de majo, kiel agado de ILEI iniciatita de Mireille Grosjean, ĝia nuna prezidanto kaj Esperantisto de la Jaro 2014. Ĝi eble ne havas ŝancon arigi dekojn da registaraj reprezentantoj, kiuj decidis pri vasta instruado de Esperanto en la publikaj lernejoj, sed ĝi estos bona okazo por prezenti la lingvon kaj movadon al kelkaj diplomatoj kaj ŝtataj reprezentantoj. Ni ne fiksiĝu je eksteraj celoj, sed laŭeble koncentriĝu al nia propra profito. Mi ne malkovros la radon, se mi skribos, ke la plej bona maniero varbi kaj elmontri la utilon de la lingvo estas uzi ĝin.

De la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazos la 100-a Universala Kongreso en Lillo (Francio). Jam nun ĝi vekas pli grandan intereson de esperantistoj ol la UK-oj en la lastaj jaroj. Je la fino de 2014 estis jam 1017 aliĝintoj. Antaŭ ni interesa aranĝo! Ĝi signos ankaŭ du trionojn de la oficperiodo de la nuna estraro kaj estos taŭga momento por resumo pri la ĝisnunaj atingoj kaj takso kiomgrade estas realigita la Strategia Laborplano, la ruĝa libreto de Fettes. Supozeble en Lillo okazos la lastaj interparoloj kun la kandidatoj por la posteno de ĝenerala direktoro de UEA, aŭ eble eĉ estos fiksita kaj anoncita la nomo de la persono kiu transprenos la postenon en 2016.



Tuj post la UK, **de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto**, okazos la 71-a IJK en Wiesbaden (Germanio) – la espero de TEJO post tri malpli grandaj kongresoj (Hanojo 2012, Nazareto 2013, Fortalezo 2014). Ke ĝi sukcesos ripeti la sukceson de Liberec el 2009 verŝajne neniu plu kredas, sed reveno al pli decnombraj IJK-oj estas bonvena. Mi aparte atendas la kulturan kaj movadan partojn de la programo. En la kongreso la komitato de TEJO elektos la novan estraron (por la oficperiodo 2015–2017); la sola certa afero estas foresto de Veronika Poór, kiu jam nun superas la TEJO-aĝon. Pri la konsisto zorgas la trikapa elekta komisiono, kompletigita en

decembro 2014 per reta voĉdonado. Ĝis la fino de la jaro al la germana IJK aliĝis 62 personoj.



La junularan kongreson sekvos la 88-a SAT-Kongreso, kiu ĉi-jare okazos de **la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto** en Nitra (Slovakio) – la kongresurbo de la 101-a UK en 2016. Tiuj, kiuj ĉeestos la kongreson de SAT havos en la posta jaro unu kialon malpli por veni al la Universala Kongreso, kio povos

riveliĝi per subtraho de deko aŭ du dekoj da aliĝintoj al la UK. Optimisto povus konstati, ke temas pri ĝenerala provo antaŭ la pli granda UK... Male ol UEA, SAT jam kongresis en Slovakio (Bratislavo 2004), sed ĉi-foje temas aldone pri la kunlaboro kun E@I, kiu manifestiĝis jam antaŭe en la formo de la reta PIV.

Ĉar la UK ĉi-jare estos eĉ pli grava evento ol kutime, mi esperas, ke ĝi ne restos nerimarkita de Fabrício Valle, la redaktoro de la revuo *Esperanto*. Ĉu en 2015 la **septembra** numero denove estos prikongresa, kiel antaŭe, male ol pasintjare, kiam la sudamerika redaktoro apenaŭ donis spacon al la sudamerika UK? Aŭ ĉu en septembro Valle ne plu redaktos la oficialan organon de UEA kaj la legantoj ne plu restos sen bazaj informoj pri la asocia vivo?

Inter septembro kaj novembro devus okazi la unua kunveno de la nova estraro de TEJO. Post la oficperiodo 2013–2015 ĝi heredos la strategion, kiun necesos finrealigi. Tio estos bona gvidlinio kiel agadi. Inter la defioj estos la decido ĉu en 2017 okazigi IJK en Afriko. Tio povas esti glora, historia momento, sed ankaŭ granda kolapso kaj plia hontigo de la junulara asocio. La grundo por tiu kongreso jam estas pretigata kaj ankaŭ la afrika-eŭropa trejnado – en kiu partoprenos la prezidanto de TEJO, Łukasz Żebrowski – estos plia okazo por esploroj.

La fino de la jaro estos la fina ekzameno por la estraro de Fettes. Tiam nigra-blanke videblos la membronombroj de UEA kaj la realigo de la planita ĉiujara 10%-a kresko de la membraro estos kontrolebla. Ĝis tiam multo povas okazi, precipe lige kun la 100-a UK en Lillo, tial estus malsaĝe taksi nun la ŝancojn surbaze de la membronombroj de 2014. La membronombroj de **la 31-a de decembro 2015** estos signifaj ankaŭ el formala vidpunkto, ĉar ili decidis la nombron de la komitatanoj B en UEA (oficperiodo 2016–2019) kaj TEJO (oficperiodo 2016–2018).

Interesa jaro antaŭ ni. Bonŝancon kaj sukceson! Al la esperantistoj – feliĉon, al la gvidantoj – saĝon, kaj al la organizoj – pliajn membrojn kaj monrimedojn!

Paweł Fischer-Kotowski

Pliaj sukcesoj de TEJO en Eksteraj Rilatoj

Post la eniro de TEJO en la ĉefa plenumorgano de IKRIO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj – <http://icmyo.org/>), estas nun la vico de sukcesoj ĉe europa nivelo.

La Ĝenerala Asembleo de la Forumo Junulara Europa (FoJE), okazinta en Cluj-Napoca (Rumanio) akceptis amendon de TEJO por havi siajn kampanjojn en pluraj lingvoj, kaj ne nur en la angla - kiel okazis ĝis nun. Tiu ĉi sukceso des pli valoras ĉar la estraro de FoJE donis sian kontraŭan opinion antaŭ la voĉdono. Tre helpis la daŭra retumado kaj kontaktado kiujn la TEJO-representantoj – Michael Boris MANDIROLA kaj Veronika POÓR – elstare entreprenis kun ĉiuj aliaj organizoj tie reprezentitaj.

La asembleo ankaŭ aprobis la novan kondutkodon de FoJE, kiu aparte inkluzivas kontraŭon al lingva diskriminacio.

Plia ĝojiga novaĵo estas la elekto de Michael Boris MANDIROLA en la CBMA (Consultative Body on Membership Applications – Konsulta Konsilio pri Membraj Aliĝpetoj) de la Forumo Junulara Eŭropa. La konsilio, en kiu membras du reprezentantoj el Naciaj Junularaj Konsilioj

kaj du el Internaciaj Junularaj Neregistaraj Organizo, havas la taskon trakti la membriĝpetojn de novaj organizoj, la statusŝanĝpetojn de la nunaj membroj kaj ĝiajn membrecreviziadojn por verki rekomendojn al la membrokonsilio.

Plia atesto pri rekono de TEJO kiel serioza partnero kaj agadoriĉa organizo, fidinda kaj kunlabora. Ni ĉiuj bondeziras sukceson al Michael Boris en lia nova posteno serve al la Eŭropa junularo.

Tiu ĉi sukceso sekvas multjaran laboron de TEJO en Eksteraj Rilatoj kaj en aktiva multjara aktiva partopreno en plej diversaj agadoj de FoJE, el Ĝeneralaj Asembleoj, al laborplanaj diskutoj, el renkontiĝoj pri junulara laboro al internacia kunlaboro kun Ĉinio kaj Afriko, kaj en multaj aliaj.

Tiu ĉi sukceso estas sukceso de ĉiuj laborantoj kaj subtenantoj, kaj ĉiujn mi volas elkore danki per tiu ĉi mesaĝo.

Se vi volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bv. konsideri donaci tra UEA kun priskribo: "TEJO-KER". Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html.

Francesco Maurelli, Komisiito de TEJO pri Eksteraj Rilatoj



*La komitato de TEJO kunvenis fine de decembro.
Komitatano por Danio Filippo Botta videblas dekstre antaŭe en blua pulovero.*

Esperantaj noveloj tradukitaj sveden



Aperis la antologio *Söka bostad i storstaden och andra noveller* översatta från originalen på esperanto av Leif Nordenstorm och Sten Johansson (Serçi loĝejon en grandurbo kaj aliaj noveloj tradukitaj el la Esperantaj originaloj de Leif Nordenstorm kaj Sten Johansson).

Tio estas la titolo de la 231-paĝa nova libro en la sveda lingvo. Ĝi estas antologio kun 29 noveloj el diversaj epokoj, stiloj, landoj kaj kontinentoj. Ĝi estas frukto de plurjara laboro. La ideo estas, ke svedlingvaj neesperantistoj havu eblecon konatiĝi kun Esperanta literaturo, kaj ke nia

literaturo fariĝu konata, ĉar ĝi tion meritas.

Sten Johansson verkis enkondukon pri la Esperanta novelarto. La novelaro estas nomita laŭ la samtitola novelo de Giorgio Silfer.

En la antologio aperas noveloj de Julio Baghy, Marjorie Boulton, Michail Bronštejn, Jorge Camacho, Liven Dek, Stellan Engholm, István Ertl, Miguel Fernández, Lina Gabrielli, Sten Johansson, Lena Karpunina, Masayuki Kuroda, István Nemere, Leonard Noel Mansell Newell, Leif Nordenstorm, Kenelm Robinson, Sen Rodin, Raymond Schwartz, Manuel de Seabra, Giorgio Silfer, Ivan Gennadieviĉ Ŝirjajev, Trevor Steele, Spomenka Ŝtimec, Ferenc Szilágyi, Endre Tóth, Vladimír Váňa, Paulo Sérgio Viana, Tim Westover, kaj Ye Junjian.

Leif Nordenstorm [La Balta Ondo]

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO 2015



Elrigardo el ĉambro

7-a de Marto ĝis 14-a de Marto 2015

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

Aliĝkotizo: 60 eŭroj (familia aliĝkotizo: 100 eŭroj)

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

Limdato : 2014/12/01 *Poste... se plu restos lokoj !*



Laboro: Arne Casper deĵoras en nia budo la 1-an de februaro. ↓



↑ Festo: publiko, parolantoj, libroservo kaj vivanta muziko la 14-an de decembro.